



MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA

DIREKTORO: RAMÓN DE SALAS

Administracio kaj Redakejo: Str. RODA, n.º 14-16

R
I
Z
K
U
L
T
U
R
O



E
N
A
R
A
G
O
N
O

Rizsemado en ĝermkampojn

(Daŭrigo)

La grundo de ĉi tiu firmo estis tiom multe salhava, ke en iaj jarsezonoj, dum kiuj la vaporigo estas intensa, ĝi blankiĝis ĉe multaj lokoj, kvazaŭ ili estus neĝokovritaj, kaj, kvankam la saloj kaŭzantaj la efloreskojn estis kloridoj kaj sulfatoj el tiuj, kiuj konsistigas la "blankan alkalsalon", kiu estas la malplej timinda salo, la provo rezultis ja malfacila pro la grandega salkvanto, kiun oni bezonis apartigi de la grundo, por ke tiu ĉi estu kulturebla.

La klasika rimedo daŭre inundi per senĉese ŝanĝata akvo liveris kompreneble kontentigajn rezultatojn. Ĝi ebligis post sufiĉe da tempo, krei bonnegajn tritikkampojn kaj densajn herbejojn tie, kie antaŭe nur kelkaj neutilaj kreskaĵoj vivadis; sed tiu rimedo montriĝis malrapida, tre malrapida, kaj postulis grandegan akvokvanton, produktante dume neniun gajnon por la terkulturisto.

Tial, kvankam oni komprenis, ke ĉi tiu rimedo estas nedubbele utila, oni intencis tuj anstataŭi

ĝin per alia pli kontentiga laŭ ekonomia vidpunkto, kaj post kelka pripensado oni decidis prove kulturi rizon en la terpecoj sensaligitaj.

Rizo en Aragono!

Ĉi tiu intenco ŝajnis tute nesukcesanca, kaj tamen de antaŭ kelkaj jaroj ĝi estas profitodona realaĵo.

La publiko kredas, ke rizkulturo nur povas sukcesi en regionoj, kies ĉielo estas ĉiam luma kaj kie printempo estas milda, somero longa kaj varma kaj aŭtuno agrabla kaj sen fruaj malvarmoj, kiel okazas ekzemple en la orienta marbordo de Hispanujo, kaj, kvankam nedubbele ĉi tiun plan-taĵon multe malhelpas la malfruaj printempaj frostoj, kaj ĝi bezonas multe da varmo por tute elkreski, estas necese ne forgesi, ke ekzistas multaj rizrasoj, kies natura vivlongo estas relative mallonga kaj kiuj kapablas perfekte maturiĝi en tiaj klimatoj, kiaj tiu de la regiono, kie estas "La Melusa".

(Daŭrigota).

Ligo de Nacioj

La ideo pri komunumo de Ŝtatoj estas, eble, tiel antikva, kiel la homo. La filozofia skolo konsideradis ĝin kiel aferon el natura juro. Poste, la historia skolo deduktis ĝin el la faktoj; kaj, fine, la eklektika skolo, kunfandiĝo de la du supre diritaj, starigis la doktrinon, ke la internacia komunumo ekzistas, ne nur pro la volo de la Ŝtatoj, sed tial: ke ĉi tiuj havas reciprokajn rajtojn kaj devojn.

Por Hispanujo estas kaŭzo de fiero, tio ke ĝi estis ĉefa antaŭeniganto je tiu ĉi koncepto pere de siaj teologoj kaj kanonistoj de la XVI-a jarcento, kaj precipe pere de la eminenta Francisko Vitoria, kiu, per siaj famaj lekcionoj ĉe la Universitato de Salamanko estas la iniciatinto de la internacia juro. Sur la ideoj de li ekkonigitaj laboris gloraj eminentuloj, kiel, ekzemple Grocio, Suarez, Soto kaj aliaj.

Li konceptas la intergentan juron, kiel devenintan el la sociema instinkto, kiel spontanee juron de la homaro, kiel faktan enkondukitan surbaze de la natura juro kun la ĝenerala konsento de la nacioj profite al la komuna bono.

Kaj, kiel korelativa je tiu ĉi abstrakta koncepto pri internacia komunumo, aperis la ideo krei organizon, kiu ĝin reprezentus por la ĉefa celo firmigi la pacon en la mondo.

La unua projekto estis tiu de Petro Dubois en la XIV-a jarcento. Kenriko IV-a, de Francujo, proponis starigon de granda, kristana respubliko konsistanta el dek kvin eŭropaj Ŝtatoj.

Saint Pierre prezentis al la Kongreso de Utrecht planon pri Ligo de 49 Ŝtatoj, kun "reprezentantaro"; tiu projekto estis popularigita de Rousseau.

Bentham proponis la starigon de konstanta kongreso kun internacia armeo.

Ĉiuj ĉi projektoj koncernas nur Eŭropon.

Kant, en sia verko "La konstanta paco" (1795), starigas ties bazojn kaj pritraktas ligan aŭ federacion de Ŝtatoj, universalan civitanecon k. t. p. En la XII-a jarcento komenciĝas la projektoj bazitaj sur la ŝtata reprezentado, kaj en ĉiuj el ili oni konstatas la influon de la ideo pri "internacia kunagado", unue ekkonigita de Vitoria kaj Suarez.

Alproksimiĝas la efektiviĝo je tiel karesita projekto.

Wilson, inspirita de Kant, en 1917, ekkonigas la ideon pri starigo je ligo de Ŝtatoj sur la jenaj bazoj: Libera societo, kolektivaj garantioj kaj kreo de internaciaj komunaj organizoj (leĝodona, plenuma kaj juĝista povo).

Ĉe la Pariza Konferenco du tendencoj manifestiĝis: tiu saks-angla konfidanta la pacon al la publika opinio kaj tiu latina reprezentata de Clemenceau, kiu proponis politikajn kaj plenumadajn garantiojn pere de internacia armeo.

Venkis meza kriterio por akordigi la agadkampion de la internacia organismo kun la sendependeco de la Ŝtatoj.

La celo de la L. de N. estas intensigi la internaciajn rilatojn kaj eviti la militon. Ĝi havas diversajn organojn:

Konstituciaj organoj.—La Kongreso: Ĝin konsistigas tri reprezentantoj el ĉiu Ŝtato kun nur unu

voĉdonrajto. Ili povas esti asistataj de spertuloj.

Konsilantaro.—Estas konstantaj postenoj (la ĉefaj nacioj) kaj malkonstantaj postenoj (reprezentantoj de la Kongresmembroj).

Sekretariado.—Ĝi estas esence kvazaŭ internacia ministraro, kiu preparas la laboron por ĉiuj organismoj de la L. de N.

Helpaj organoj.—Internaciaj komisionoj por malmaligo, mandatoj k. t. p.

Agadaj rimedoj.—Oni rekomendas la reduktadon je bataliloj. (Wilson proponis la tutan malarmanadon). Kolektiva garantio por respekti kaj subteni la sendependon kaj tutecon de la Ŝtatoj-anoj kaj aliaj rimedoj, kiujn la Konsilantaro povas decidi, nome, arbitracio, publikigon je traktatoj, ekonomiajn sankciojn, forpelon kaj eĉ perarmilan komunan agon.

Pro manko de spaco, ni faris nur skizon pri tio, kio estas la Ligo de Nacioj, tiu Instituto, kiu montras aplaŭdindan deziron de la homaro, kaj kiu, pro tio ke ĉi tiu bedaŭrinde ne estas ankoraŭ en grado de necesa perfekteco ne donas la dezirindajn fruktojn.

Sed ni devas ne senkuraĝiĝi. Ĉiu granda tasko spertis malprosperojn, kiuj efikis por plifirmigi la vojon de la progreso.

El hispana lingvo tradukis,

ANTONIO CASTILLO.

(el la rondo «Frateco»).

Ni ricevis la bultenon de "Internacia Hejmo Esperantista" — Aspremont (A. M.)-Franclando—, kiu anoncas sian nunjaran, someran restadejon por libertempuloj en la bela, franca regiono. Ni deziras plenan sukceson al ili.

La scivola esperantisto

Kiam mia amiko venis min viziti, mi estis skribanta en mia studoĉambro.

Li min afable salutis kaj demandis: ĉu vi laboras super via hispan-esperanta vortarego?

—Ne, mia kara, mi skribas artikolon pri la interesa demando, ĉu kuloj en somero pikas pli dolore antaŭ noktomezo aŭ poste.

—Ha, sinjoro, mi kredas, ke ili pikas pli furioze kiam ni estas sendormaj.

—Aŭ eble, kiam ili estas malsategaj: tial oni devas esplori serioze la demandon, kolektante fidindajn sciigojn, kaj ilin kritike esplorante por veni al ĝusta konkludo.

—Tre bone, sinjoro, sed mi nur venis por peti al vi klarigon.

—Al mi klarigon? Ĉu mi bezonas ian klarigon?

—Ne vi, sinjoro, ĝi estas mi, kiu bezonas klarigon.

—Ha bone, vi, do, devas diri: mi petas *de vi klarigon* aŭ mi petas *vin pri klarigo*. Tiamaniere oni komprenas, ke vi petas *mian klarigon*, sed dirante, mi petas *al vi klarigon*, vi igas kredi, ke vi petas de alia persono klarigon *al mi* aŭ *por mi*.

—Dankon, sinjoro, via klarigo estas perfekta, sed mi deziras demandi vin pri tio, kiom da Esperantistoj estas en nia lando?

—Mi ne scias, mia kara, mi ne havis tempon ilin kalkuli: eble ili estas 300.000 ĉirkaŭe.

—Ho, kiel bele, tiom da Esperantistoj estas en Hispanio?

—Pardonu, mia kara, kial vi ne diras: “en Hispanujo? Ĉu vi ne scias, ke la akademio forrifuzis tiujn strangajn io-vortojn? Ke D-ro Zamenhof en *Fundamento* (Ekzercaro, § 15) skribis: “Mi vojaĝas en Hispanujo. Mi vojaĝas en Hispanujon?” Estas ja tiel bele, ke nia lingvo havas ian apartan sufikson por formi landnomojn.

—Jes, sed atentu, sinjoro: Kion signifas Hispanujo? Ĉu ian ujon (keston aŭ skatolon), kie estas hispanoj?

—Tute, ne, mia kara, la hispanoj sendube ne ŝatas, ke oni ilin metu en keston, almenaŭ dum vivo. Kiam ili mortos nepre oni ilin metos en keston aŭ ĉerkon.

—Sed rimarku alian malutilon de la uj-vortoj. *Pomujo* povas signifi samtempe la arbon, kiu produktas pomojn kaj keston, kiu enhavas kelkajn pomojn.

—Pardonu, mia kara, la senco ĉiam helpas, se ni diras, ekzemple, ke nia prapra... patrino Evo proponis pomon al la naŭega Adamo por tenti lin en pekon, ĉu Evo deŝiris la pomon de pomarbo aŭ eltiris ĝin el pomkesto?, kompreneble se tiam ekzistis kestoj aŭ ĉarpentistoj por ilin fari.

—Eble ili ekzistis, ĉar *penti* estis la tuja sekvo de la peko. Sed spritajoj ne helpas, ni devus esplori serioze la aferon.

—Bone, mia kara, ni lasu la ŝercon. Se *pomujo* estas duba vorto, vi povas uzi laŭ la senco, pomarbo aŭ pomkeston. Se *Hispanujo* ne plaĉas al vi, vi povas uzi *Hispanlandon*.

—Ne, mi ne konsentas, ĉar Hispanlando signifas la hispanan landon.

—Kion, do, vi volas esprimi?

—Ĉion, kio koncernas nian patrujon.

—Kaj ĉu patrujo estas kesto, kie eble dormas nia patro, sekvante la ekzemplon de tiu granda reĝo, kiu konstruigis al si ĉerkon por dormi?

—Ho, ne ŝercu, sinjoro, Hispanio volas ĉion esprimi: nian landon, nian sunon...

—Sed, ĉu vi ne scias, ke la “Suno hispana” jam malaperis?

—Ne, moku, mi petas, por Hispanio mi volas esprimi ankaŭ niajn bongustajn vinojn, niajn belegajn fajrajn virinojn...

—Ĉu vi preferas la blondajn aŭ brunajn?

—Ĉiujn mi ŝatas.

—Kaj ankaŭ per Hispanio vi volas signifi niajn taŭrobatalojn?

—Kompreneble, sinjoro: ĉu vi legis la belan tradukon de “Sango kaj sablo”, kiun faris nia lerte-ga samideano Salas?

—Jes, mi legis ĝin plej ŝate. Sed ni revenu al nia demando: laŭ via opinio Hispanio estas plej signifanta vorto, kiu entenas ĉion, kio rilatas al ni, hispanoj, kaj al niaj aferoj?

—Ĝuste, plej ĝuste, sinjoro.

—Nu, kial, do, vi uzas la vorton “Hispanio”, kiu nur signifas “io hispana”? Se vi volas esprimi ĉion hispanan, vi devas diri: “Hispanĉio”!!!

Aŭdinte tion, mia amiko kvazaŭ trafite de fulmo, foriris el mia studoĉambro, eĉ ne dirinte al mi adiaŭ.

... ..

Kelkajn tagojn poste ĉe la komenco de jaro, inter multaj bondeziraj kartoj de mi ricevitaĵi mi legis unu kun jena teksto:

Plej korajn bondezirojn por la nova jaro!

Leo Noforta kaj Sovaĝa

Saksofonisto

Placo Zamenhof, 15^a

Zaragoza (Hispanĉio).

—Brave, mi pensis ridetante, se almenaŭ tiuj teruraj io-vortoj pereus pro ridindeco!

Originale verkis,

VICENTE INGLADA.

Libervola Civila Helpservo Internacia

Antaŭ nemulte ni ricevis ilustritan broŝuron eldonitan de Libervola Civila Helpservo Internacia.

Ĉi tiu institucio, kies adreso estas: 6 Klaraweg-Bern-Svislando, celas klopodi al vera amikeco internacia pere de libervolaj, helpaj laboroj farataj de siaj anoj okaze de katastrofoj aŭ similaj malfeliĉaĵoj trafintaj landon. La laboro estas senpaga. Nur ricevas la volontuloj loĝejon kaj nutraĵojn. La devizo de L. C. H. I. estas: “Ne nur vortoj, sed agoj”. Jen bela, laŭdinda kaj praktika maniero plenumi la internan ideon de Esperanto kaj jen vasta agadkampo por nia kara lingvo.

La broŝuro, interesa kaj bone presita, estas ricevebla kontraŭ respondkupono.

La Katedralo de Toledo

(Bl G. Adolfo Bécquer—1868)

¡La katedralo de Toledo! Imagu arbaron de gigantoj, granitajn palmojn, kiuj interplektas siajn branĉojn, formante kolosan kaj belegan arkadaron, sub kiu ŝirmiĝas kaj vivadas per la vivo, kiun pruntis al ĝi genio, tuta kolekto da imagaj kaj realaj estaĵoj.

Imagu nekompreneblan haoson de ombro kaj lumo, kie miksiĝas kaj konfuziĝas kun la lumoj el la koloraj vitroj de la ogivaj fenestroj la olea lumo de la lampoj, kiu batalas kaj perdiĝas en la senlumeco de la sanktejo. Revu pri ŝtona mondo grandega, kiel la spirito de nia religio, malhela, kiel ĝiaj tradicioj, enigma, kiel ĝiaj simboloj, kaj ankoraŭ vi havos malproksiman ideon pri tiu eterna monumento, ĉe kiu la entuziasmo kaj memfido de niaj prapatroj dum kelkaj jarcentoj kolektadis obstine la trezoron de siaj kredaĵoj, de siaj inspiroĵoj kaj artoj.

En ĝia interno vivas, silento, majesteco, mistika poezio kaj sankta teruro, kiu defendas la templon kontraŭ mondaj pensoj kaj mizeraj pasioj de la tero.

La materia konsumiĝo moderiĝas spirante la puran aeron de la montoj; la ateismo devas resaniĝi same spirante ĝian konfidigan atmosferon.

Sed, se granda, se impona, prezentiĝas la katedralo antaŭ niaj okuloj, en kia ajn horo oni iris en ĝian misteran kaj sanktegan internajon, neniam ĝi kaŭzas impreson tiel profundan, kiel dum la tagoj en kiuj ĝi elmontras ĉiujn trezorojn de sia religia pompo, dum kiuj ĝiaj sanktaj ŝrankoj estas kovritaj per oro kaj gemoj ĉiuspecaj; ĝiaj planoj kaj ŝtupoj, per tapiŝoj kaj ĝiaj kolonegoj, per tapetoj.

Tiam, kiam oleo brulas kaj lumas abunde en ĝiaj mil arĝentaj lampoj, kiam ŝvebas en la aero bonodoraj funnuboj, kaj la voĉoj de la horo kaj la orgenaj harmonioj kaj la turaj sonorilegoj tremigas la konstruaĵon de la plej profundaj fundamentoj ĝis la plej altaj, turaj stangopintoj, kiuj ĝin kronas, tiam estas, kiam oni komprenas, sentante ĝin, la teruregan majestecon de Dio, kiu vivas en la tempo, animas ĝin per sia blovo kaj plenigas ĝin per la disradiado de sia ĉiopovo. Tiam estas, kiam oni konas la superbelegan grandiozecon de la katedralo de Toledo.

Tradukis,

J. M. CODERQUE.

Ateca (Zaragozo).

K I S O J

(Fama hispana kvarversaĵo)

Surfruntaj kisoj, ĉasteco
Surokulaj, iluzi'
Survangaj, dolĉa boneco
Surlipaj, arda pasi'

Esperantigis

M. VÁZQUEZ.

XVIII Kataluna Esperanto-Kongreso

XVII Internaciaj Floraj Ludoj

Manresa, 31 majo, 1 kaj 2 junio 1936.

La Prezidanto de Kataluna Esperantista Federacio, ano de "Frateco", per afabla letero petis al ni, kaj ni tre volonte kompleksas lin, publikigi la jenan inviton:

"Niaj katalunaj samideanoj daŭrigante sian konstantan laboron por Esperanto havos sian nunjaran Kongreson en la bela urbo Manresa, kies loka grupo "Bela Espero" kun entuziasmo prenis sur sin la pezan organizan taskon.

La alloga kongresprogramo enhavas krom la kutimaj laborkunsidoj, oficialan akcepton ĉe la Urbodomo, la belan poezian Feston "Internaciaj Floraj Ludoj", festenon, ekspozicion, vizitojn, koncertojn, ekskurson, k. t. p.

La kataluna Ministro de Kulturo, sinjoro Ventura Gassol, akceptis la honoran prezidantecon de la Kongreso kaj partoprenos la Malferman Kunsidon dum kiu li alparolos la esperantistojn.

La XVII Internaciaj Floraj Ludoj aljuĝos tridek premiojn. Rimarkinde estas, ke dek-unu ur-

bestroj donis premion por tiu konata literatura konkurso, kiun partoprenas verkistoj el ĉiuj landoj. La prezidanto de la XVII I. F. L. estas la malnova pioniro sinjoro Fred. Pujolà i Vallès, unu el la fondintoj de Kataluna Esperantista Federacio, kiu reaperas en nia movado post multjara forestado.

Niaj katalunaj kurbatalantoj esperas, ke multaj esperantistoj el la diversaj hispanaj regionoj partoprenos la Kongreson kaj tiu espero precipe koncernas la aragonajn esperantistojn kun kiuj ĉiam ekzistis plej amikaj rilatoj".

Ni aparte ni deziras grandan sukceson por la Kongreso kaj instigas la aragonajn samideanojn partopreni ĝin grandnombre.

« N I A G A Z E T O »

Ĉi tiu esperanto-gazeto, eldonata en Francujo, kies formato estas 43'5 × 31'5 centimetra, konsistas el multaj paĝoj ilustritaj per belaj fotografioj kaj estas redaktata de profesiaj gazetistoj nome: Georges Avril, S. Grenkamp-Kornfeld, Julio Baghy ktp., kies nomoj estas ja tre multe konataj en Esperantujo kaj garantias la bonstilon kaj altan intereson de la enhavo.

La abonejo en Hispanujo por ĉi tiu tre grava, ĉiumonata gazeto estas "Aragona Esperanto-Federacio" — strato Roda 10, Zaragozo —, do ĉiuj hispanoj dezirantaj ĝin aboni faru la abonpeton pere de ĝi.

Jarabono por hispanoj: 6'45 pesetoj, sendokostoj enkalkulita.

NEKROLOGO

La 28.^{an} de Marto mortis en nia turbo la patrino de nia antikva samideano Sro. Manuel Delpón, ni partoprenas lian ĉagrenon esprimante al Sro. Delpón kaj familio, je la nomo de "Frateco", nian plej koran kondolecon.

SPRITAĴOJ

Troigemuloj:

—En mia ĝardeno estas ĉo, kiu ripetas 888 fojojn unu diritan vorton.

—Tio ja ne gravas. En tiu mia estas ĉo, kiu, kiam iu ternas, tuj diras: Ĝi portu al vi sanon!

* * *

Patro—Nu, ĉu vi estas surda? Mi jam sep fojojn vokis vin.

Fileto—Pardonu min, paĉjo; ili nur estis ses fojoj, mi precize kalkulis ilin.

* * *

—Avino, kiom aĝa estas la kato?

—Malpli, ol unujara.

—Nu, kial do ĝi havas lipharojn kaj mi ankoraŭ ne.